Interlingvistikaj Kajeroj

# The (inter)linguistic ecology of education

## *La (inter)lingva ekologio de la edukado*

Mark Fettes

ABSTRACT The text is a revised version of a public lecture delivered in Parma, Italy, on February 9, 2010. It outlines a definition of linguistic ecology and analyzes the role of the formal education system in the linguistic ecology of modernity. The shift from solid to liquid modernity is shown to have far-reaching implications for schools and for languages that in turn are bound up with the ecological health of the planet. I argue that interlinguistics can yield important insights into the linguistic ecology of transmodernity, a systemic alternative to the present sociological impasse[1].

RESUMO La teksto estas reviziita versio de publika prelego prezentita en Parma, Italio, la 9an de februaro, 2010. Ĝi skizas difinon de lingva ekologio kaj analizas la rolon de la formala eduksistemo en la lingva ekologio de la moderneco. Montriĝas ke la transiro de solida al likva moderneco kuntrenas profundajn sekvojn por la lernejoj kaj la lingvoj, kaj ke ĉio ĉi kunplektiĝas kun la ekologia sano de la planedo. Mi argumentas, ke la interlingvistiko povas grave kontribui al nia kompreno pri la lingva ekologio de la transmoderneco, konceptita kiel sistema alternativo al la nuna sociologia sakstrato[2].

Originale bilingue / *Dulingva originalo*

*InKoj. Interlingvistikaj Kajeroj* 1:2 (2010), 139–153 ISSN 2037-4550
http://riviste.unimi.it/index.php/inkoj/
(cc) InKoj. Dipartimento di Filosofia, Università degli Studi di Milano.

# 1 Introduction / Enkonduko

Let me begin by defining the term "linguistic ecology," which has not yet attained sufficient currency as to be self-evident[3].

"Ecology" we might define as the study of complex systems – above all, living systems – characterized by many mutually dependent relationships between their various parts. (The word is often used for the system itself as well.) As a general rule, such ecological systems, "eco-systems," or "ecologies," are understood as possessing a certain coherence, an identity, which is not a property of the separate elements. Thus it is quite possible, even common, for a person to be an element in an ecosystem and yet not understand the workings of the system as a whole. One's actions help constitute and maintain the local ecology – or perhaps weaken or transform it – but one often has little idea of exactly how this happens, nor of what causes even the most obvious changes in local circumstances.

These then are the tasks of the ecological sciences: to characterize such interrelationships within an ecosystem; to understand how the system works as a whole; and to explain what can be done, inside or outside the system, to maintain or transform it.

All of us, as human beings, are members of a linguistic ecology. Every language is itself a complex system of relations among its users, its structures, its words. The best means that people have discovered for exploring such an ecology, researching it, is literature. Literature is a process of cultivating a particular linguistic ecology, nourishing it, building ties between people on the basis of new ideas and new ways of expressing and sharing them.

But linguistic ecology is not only a matter of what happens within a single language. People are not monolingual but multilingual, and through their interrelationships the many various language systems are woven together into broader systems that are even more difficult to understand and

Mi komencu per difino de la termino "lingva ekologio," kiu ankorau ne atingis sufiĉan gradon de uzateco por esti tuj komprenebla[4].

"Ekologion" oni povus difini kiel la esporadon de kompleksaj sistemoj – unuavice vivantaj sistemoj – kiujn karakterizas multaj reciprokaj interdependaj rilatoj inter iliaj diversaj eroj. (La vorton on ankaŭi ofte uzas por indiki la sistemon mem.) Ĝenerale oni komprenas, ke tia ekologia sistemo, "eko-sistemo," aŭ "ekologio" havas ian koherecon, ian identecon, kiu ne estas propra al ĝiaj partoj. Tiel, homo povas esti (eĉ kutime estas) parto de ekosistemo, tamen ne plene komprenante, kiel la sistemo funkcias kiel tuto. La propraj agoj helpas konsistigi kaj vivteni la lokan ekologion – aŭ eventuale malfortigi aŭ transformi ĝin – sed oni ofte ne scias, kiel precize tio okazas, nek la kaŭzon de eĉ plej evidentaj ŝanĝoj en la lokaj cirkonstancoj.

Tio estas do la taskaro de la ekologiaj sciencoj: karakterizi tiajn interrilatojn; kompreni, kiel la sistemo funkcias kiel tuto; kaj klarigi, kion anoj de la sistemo povas fari por vivteni aŭ transformi ĝin.

Ni ĉiuj, kiel homoj, estas anoj de lingva ekologio. Ĉiu lingvo mem estas kompleksa sistemo de rilatoj inter ĝiaj uzantoj, ĝiaj strukturoj, ĝiaj vortoj. La plej bona rimedo, kiun la homoj elpensis por esplori tiun ekologion, estas literaturo. Per literaturo oni fakte kultivas difinitan lingvan ekologion, nutrante ĝin, kunligante la homojn per novaj ideoj kaj novaj manieroj esprimi kaj dividi ilin.

Sed lingva ekologio ne estas nur enlingva afero. Homoj ne estas unulingvaj sed multlingvaj, kaj per iliaj interrilatoj interplektiĝas la multaj diversaj lingvosistemoj en pli vastajn sistemojn, eĉ malpli facile kompreneblajn kaj regeblajn. Ĝuste al tiu *interlingva ekologio* mi fokusiĝos en ĉi tiu artikolo.

to manage. It is this *interlingual* ecology that provides the focus of this paper.

## 2 The ecology of education / La ekologio de la edukado

But the title of the article draws attention to a further concept that requires explication: namely *education*. This is something we often take for granted; it can seem mundane and banal. We have all become accustomed to the idea that more than ten years of childhood are primarily spent in particular locations dedicated to transmitting knowledge about those aspects of society that are felt to be most essential – above all, reading and writing. But consider that this is a relatively recent invention. Only for the last two centuries or less have we had the idea that every child should attend school. And on this pitiable institution our societies heap their desires, their phobias, their hopes, often forgetting that the school was never intended to meet all our educational needs. In fact one might justly observe that today's mass media, in particular the powerful electronic media of television, video, and the Internet, are taking on greater and greater educational significance for many children. Where previously they would have learned a great deal from the culture of the neighbourhood, they now spend their time absorbing the lessons of a virtual world of ever-changing images and data.

Regardless of its form or purposes, however, education always has a linguistic dimension. People are not educated in just any languages or linguistic varieties, but in a very small and select group of them; and the ways in which they are educated also have linguistic consequences. It would not be too much to say that the so-called modern languages like Italian are creations of the education system: the latter constitutes the essential infrastructure of their linguistic ecology. This point is sufficiently important to warrant a more detailed expla-

Sed la artikola titolo enfokusigas plian koncepton, al kiu ni donu apartan atenton dum momento. Temas pri *edukado*. Tio eble ja ŝajnas al vi tute ordinara afero, eĉ banala. Ni ĉiuj alkutimiĝis al la ideo, ke infanoj dum pli ol dek jaroj de sia junaĝo iradas al specialaj lokoj, kie oni klerigas ilin pri la sciokampoj, kiujn ilia socio konsideras plej gravaj – unuavice legi kaj skribi. Sed pensu, ke tio estas relative nova inventaĵo. Nur dum mapli ol du jarcentoj ekzistas la ideo, ke ĉiuj infanoj devus frekventi lernejon. Kaj sur tiun kompatindan institucion la socioj ŝutas siajn dezirojn, siajn fobiojn, siajn esperojn, ofte forgesante, ke ĝi ne estis elpensita por respondi al ĉiuj edukaj bezonoj. Fakte oni rajtus diri, ke nuntempe la amaskomunikiloj, precipe la potencaj elektronikaj rimedoj de televido, video, interreto, transprenas pli kaj pli grandan edukan rolon por multaj infanoj. Kie oni antaŭe lernis multon el la kulturo de la kvartalo, nun oni anstataŭe sorbas la lecionojn de virtuala mondo de ĉiam ŝanĝiĝantaj bildoj kaj informoj.

Sendepende de ĝia formo kaj celoj, tamen, edukado havas ĉiam lingvan dimension. Oni ne edukas per ĉiuspecaj lingvoj kaj lingvaĵoj, sed per tre zorge selektita areto da ili; kaj ankaŭ la *maniero* eduki havas lingvajn konsekvencojn. Ne estus troige diri, fakte, ke la tiel nomataj modernaj lingvoj, kiel la itala, estas kreaĵo de la eduksistemo: ĝi estas absolute esenca substrukturo de ilia ekologio. Tiu fakto estas sufiĉe grava, ke ĝi meritas pli detalan klarigon.

nation.

## 3 Schools and solid modernity / Lernejoj kaj la solida moderneco

Sociologists have a term to characterize the general social ecology of our time. In fact they have multiple competing terms! But the one I personally favour comes from the Polish-British sociologist Zygmunt Bauman[5]. According to Bauman, our modern societies came into being primarily in an effort to conquer the uncertainties of human existence. Modern science aspires to the discovery of universal laws; modern philosophy, of irrefutable truths; modern medicine, of ever-effective cures. In quest of such certainty, people built vast hierarchical and bureaucratic institutions, which in aggregate we call the state. In the original European vision, which inspired so much social activism from the 18th to the 20th centuries, every country should evolve towards a national unity assuring free participation in its institutions for all its citizens. By means of such free participation, the so-called social contract, the people of each country would contributed to a better, more settled and secure life for all.

Schools are an important part of such a state system, for they give concrete form to the ambition of initiating every child in the common life of the country. Such a unifying role is built into the very concept of the school. It follows that the language of schooling has always been an important political issue, and that the ambition has always been to have just one or at most two languages in that role, even in countries with many dialects and languages. The languages of schooling are always also languages of literature and of economic activity: languages through which one can imagine oneself to be a paid-up member of the national culture. It is precisely this role of schools in cultivating a common ideal image of the country and of one's own identity that hinders the integration of additional languages within the school

Sociologoj havas terminon por karakterizi la ĝeneralan socian ekologion de nia epoko. Fakte ili havas plurajn terminojn kiuj konkurencas inter si! Sed la priskribo, kiun mi mem plej ŝatas, venas de la polabrita sociologo Zygmunt Bauman[6]. Laŭ Bauman, niaj modernaj socioj kreiĝis unuavice per la klopodo venki la malcertecojn de la homa ekzisto. La moderna scienco aspiras malkovri leĝojn universala validajn; la moderna filozofio, verojn nerefuteblajn; la modern medicino, kuracilojn ĉiam efikajn. Cele al tiu certeco, la homoj konstruis vastajn instituciojn hierarkiajn kaj burokratajn, kies kolektivon ni nomas ŝtato. Laŭ la origina eŭropa vizio, kiu inspiris tiom da socia agado de la 18a ĝis la 20a jarcentoj, ĉiu lando evoluu al nacia unueco kiu garantias liberan partoprenon en ĝiaj institucioj por ĉiuj civitanoj. Per tiu libera partopreno, la tiel nomata socia kontrakto, la anoj de ĉiu lando kontribuos al pli bona, pli trankvila kaj certa vivo por ĉiuj.

Lernejoj estas grava parto de tiu ŝtata sistemo, ĉar ili enkorpigas la ambicion enkonduki ĉiujn infanojn en la komunan vivon de la lando. Tiu unueciga rolo estas konstruita en la koncepto mem de lernejo. Sekve, la lingvo de la lernejo ĉiam estis grava politika temo, kaj ĉiam oni aspiris havi unu, maksimume du ĉefajn lingvojn, eĉ en landoj multdialektaj aŭ multlingvaj. La lernejaj lingvoj estas ĉiam ankaŭ literaturaj lingvoj kaj ekonomiaj lingvoj: lingvoj, per kiuj oni povas imagi sin plejrajta ano de la nacia kulturo. Ĝuste tiu rolo de la lernejoj en la kultivado de komuna ideala bildo pri la lando kaj pri la propra identeco malfaciligas la integradon de pliaj lingvoj en la lerneja sistemo. Nur tre pene oni ellaboras foje lokon por minoritata lingvo apud la nacia, kaj eĉ por la gepatroj, kiuj mem parolas tiun lingvon, povas esti malfacile akcepti ĝin kiel plenrajtan stu-

system. Only with great effort have people occasionally won a space for a minority language beside the national language, and even for parents who speak the former it can be difficult to accept it as a full-fledged object or medium of study in the official curriculum.

This, then, is the traditional role of the schools in the linguistic ecology of modernity: to provide children, as it were, with a model of that solid, unitary national language which they are asked to adopt as their own, whatever their personal linguistic background might be. All other linguistic purposes attributed to the school are accessory to this one. Naturally, this includes the teaching of foreign languages. Whole libraries have been written about how to teach foreign languages effectively, ignoring the fact that schools are designed expressly to *hinder* the learning of any language but the national language.

This is one aspect of what Bauman calls the "solidity" of classical modernity. It requires clear boundaries for its functioning, within which everything is supposedly well-ordered, coherent and consistent. Of course this is a fiction, a fantasy: human life is not such as to allow for such orderliness. But it is an ideal that exerts profound influence on people's thoughts and choices. If you pay attention to the slogans of a political campaign, you'll see that they generally evoke some aspect of that ideal order: more reliable health services, better schools, higher pensions, and so on. Even more honest politicians!

This, then, yields one basic law of linguistic ecology: by means of the schools, the national languages acquire their characteristic solidity, in response to human aspirations to something permanent and reliable that can anchor them, so to speak, in a world of constant change. It is probably not possible to bring about any fundamental change in this function of the school without abandoning the present system

dobjekton aŭ peran lingvon de la oficiala lernprogramo.

Tio do estas la tradicia lingvoekologia rolo de la lernejoj: prezenti al la infanoj kvazaŭ modelon de tiu solida, unueca nacia lingvo kiun ili akceptu kial sian propran, sendepende de ilia propra lingva fono. Ĉiuj aliaj lingvaj celoj, kiujn oni trudas al la lernejo, estas fakte akcesoraj. Tio kompreneble inkluzivas la instruadon de fremdaj lingvoj. Oni verkis tutajn bibliotekojn pri tio, kiel instrui fremdajn lingvojn, preterlasante la fakton, ke lernejoj estas konstruitaj ĝuste por *malhelpi* la lernadon de aliaj lingvoj krom la nacia.

Tio estas aspekto de tio, kion Bauman nomas la "solideco" de la klasika moderneco. Ĝi funckias per klaraj limoj, ene de kiuj ĉio estas bone ordigita, kohera, konsekvenca. Kompreneble tio estas fikcio, fantaziaĵo: la homa vivo ne estas tia, ke oni vere povas ĉion tiel ordigi. Sed tiu idealo influas profunde la pensadon kaj elektadon de homoj. Se vi atentos la sloganojn de tipa politika kampanjo, vi vidos ke ili ĝenerale elvokas iun aspekton de tiu ideala ordo: pli fidindaj sanservoj, pli bonaj lernejoj, pli altaj pensioj, kaj tiel plu. Eĉ pli honestaj politikistoj!

Do, jen unu baza lingvoekologia leĝo: per la lernejoj la naciaj lingvoj akiras sian tipan solidecon, respondante al la sopiroj de la homoj pri io konstanta kaj fidinda kiu kvazaŭ ankras ilin en mondo de konstanta ŝanĝo. Verŝajne ne eblas fundamente ŝanĝi tiun rolon de la lernejo sen komplete renversi la sistemon kaj ĝin rekomenci sur nova bazo.

completely and beginning again.

## 4 Languages and liquid modernity / Lingvoj kaj la likva moderneco

In the second half of the 20th century, however, something unexpected happened that we have since come to label "globalization". It came about as a consequence of the fact that the various nation-states are not in fact isolated and autonomous, but integrated in a broader system of trade and communication; their parallel evolution, following the logic of solid modernity, facilitated the flow of information, money, people, and goods across national borders. And this development underpinned an ever-stronger tendency to think in terms of individual freedom rather than national identity. In the age of classical modernity these two ideals were thought to go together: by establishing judicial and political systems under democratic control, one could achieve maximum liberty for each individual citizen. But the rise of modern totalitarianism (as in the Soviet Union or Nazi Germany) showed how such a vision could be manipulated, and the emerging transnational system invited other conceptions of freedom. In this way the modern concept of human rights came into being, as a collection of principles independent of the decisions of states that might be thought of as defining a kind of inalienable planetary citizenship.

Liquid modernity, as Bauman calls it, is modern in the sense that it still aspires to universality, it works by means of universal rules, and it encompasses all aspects of life. But where solid modernity aimed at confident foreknowledge of one's destiny, liquid modernity resigns itself to existential uncertainty. No longer can one hope to find a job for life: now one must be satisfied with a few years at a time. No longer can one believe in governments' power to manage the economy by decree: now one takes for granted that much depends on people and institutions in other countries,

Tamen en la dua duono de la 20a jarcento okazis io neantaŭvidita, al kiu oni poste gluis la etikedon "tutmondiĝo". Temas pri tio, ke la diversaj naciaj ŝtatoj, kiuj tamen ne estas izolitaj kaj aŭtonomaj sed integritaj en pli vasta ekonomia kaj komunika sistemo, evoluis samdirekte lau la logiko de la solida moderneco, faciligante la fluon de informoj, mono, homoj, varoj trans landlimojn. Kaj tiu evoluo subtenis alian evoluon de la pensado de la homoj, kiu emfazas ne tiom nacian identecon kiel individuan liberon. En la periodo de klasika moderneco oni konceptis tiuj du celojn kune: per kreo de jura kaj politika sistemoj sub demokratia regado, oni atingos maksimuman liberon por ĉiu unuopa civitano. Sed la kreo de modernaj despotismoj (kiel Sovetunio aŭ nazia Germanio) montris, kiel tiu vizio povas esti manipulata, kaj la ekestanta transnacia sistemo invitis aliajn konceptojn de libero. Tiel do naskiĝis interalie la moderna ideo pri homaj rajtoj, kiel aro de principoj sendependaj de la decidoj de la ŝtatoj, kiuj kvazaŭ difinas iun planedan civitanecon kiun posedas ĉiuj homoj.

La likva moderneco, kiel Bauman noman ĝin, estas moderna en tio, ke ĝi ankoraŭ aspiras universalecon, ke ĝi funkcias per komunaj reguloj, ke ĝi ampleksas ĉiujn sferojn de la homa vivo. Sed kie la solida moderneco alcelis plenan antaŭvidon pri la propra sorto, la likva moderneco rezignas, anstataŭe liverante konstantan malcertecon. Ne plu oni esperas trovi postenon por la tuta vivo: nun oni estas kontenta pri kelkaj jaroj. Ne plu oni kredas povi regi la ekonomion per registara dekreto: nun oni akceptas ke multo dependas de homoj kaj institucioj en aliaj landoj, kaj eĉ la internacia organizoj ne kapablas ĉion regi. Ne plu oni pensas, ke la infanoj vivos simile, kiel oni faris antaŭ du- aŭ tridek jaroj: nun oni cedas al la fakto de ĉiam

and even the international organizations cannot manage everything. No longer can one suppose that children will experience life in much the same way one did oneself, twenty or thirty years ago: now one yields to the certainty of ever-accelerating technical and social change.

In societies where liquid modernity already occupies a great deal of space amidst the structures of solid modernity, the old system of national languages looks more like a nuisance than a solution. There is therefore a demand for linguistic means to express the aspirations of liquid modernity, and one such means lies most readily to hand: English. It is not only that English is the most widespread modern language, and thus the one that geographically best corresponds to the ideal of universality. It is also that English is the language of the United States, the country that most unequivocally symbolizes liquid modernity. Of course this, too, is to some extent a fantasy, not reality, but fantasy plays an important role in people's minds. The dream is of an English language cut completely loose from English culture, a language without a nation, neutral, easily learned, and many people insist on believing that English is or could become such a language in spite of all contrary indications.

Such a description begs the question: but what about Esperanto? Doesn't it offer exactly this kind of longed-for neutral tool of communication, in which every individual person can feel themselves to be at home? And yes, it is certainly the case that liquid modernity offers more space to the unique characteristics of Esperanto than solid modernity could ever do. Solid modernity responds to Esperanto, "You're not a real language," or even "You undermine the national languages." Liquid modernity has none of these complexes. But it is also mistrustful of the Utopian associations of Esperanto, which recall too clearly the solidity-oriented aspirations of the nation-states. Liquid modernity tends to ask, "What can you do *for me*?",

pli rapida teknika kaj socia ŝanĝo.

En socioj, kie la likva moderneco jam okupas grandan spacon inter la strukturoj de la solida moderneco, la malnova sistemo de naciaj lingvoj aspektas pli kiel ĝeno ol kiel solvo. Oni do serĉas lingvajn rimedojn por esprimi la aspirojn de la likva moderneco, kaj unu tia rimedo plej evidente proponas sin: la angla. Ne temas nur pri tio, ke la angla estas la plej disvastigita moderna lingvo, kaj do tiu kiu plej bone respondas geografie al la idealo de universaleco. Temas ankaŭ pri tio, ke angla estas la lingvo de Usono, la lando kiu plej okulfrape simbolas la likvan modernecon. Kompreneble ankaŭ tio estas certagrade fantaziaĵo, ne realaĵo, sed la fantazio ludas gravan rolon en la kapoj de la homoj. Oni do sopiras al iu angla lingvo tute malankrita de la angla kulturo, io sennacia, neŭtrala, facile lernebla, kaj oni insistas kredi la anglan tia malgraŭ ĉiuj kontraŭaj indikoj.

Vi sendube pensas al vi mem: sed kial ne Esperanton? Ĉu ĝi ne prezentas ĝuste tiun sopiratan neŭtralan komunikilon, en kiu ĉiu unuopa homo povas senti sin hejme? Kaj jes, vi certe pravas, ke la likva moderneco donas pli da loko al la unikaj ecoj de Esperanto, ol estus pensebla por la solida moderneco. La solida moderneco respondas al Esperanto, "vi ne estas vera lingvo," aŭ eĉ "vi subfosas la naciajn lingvojn". La likva moderneco tute ne havas tiajn kompleksojn. Sed ĝi ankaŭ estas malfidema pri la utopieco de Esperanto, kiu tro memorigas pri la solidismaj aspiroj de la ŝtatoj. La likva moderneco emas demandi, "kion vi povas fari *por mi*?", ne "kiel per vi mi povas kontribui al pli bona mondo?" Kaj al tiu demando, "kion vi povas fari *por mi*?", la angla evidente havas multe pli elokventajn respondojn!

not "How can you help me build a better world?" And to that question, "What can you do *for me*?", English obviously has much more eloquent answers!

## 5 Linguistic dilemmas of education / Lingvaj dilemoj de la edukado

It may already be apparent why the schools built by solid modernity are now confronted with real difficulties, even a kind of crisis — for the era of liquid modernity imposes on them challenges to which they are entirely ill-suited. It is certainly true that schools aim to expand the individual freedom of the learners, but only within the borders of the state. And it was also supposed that the learners would have local origins, so that the main challenge would be to detach them from their local heritage and cultivate their sense of national identity. Now liquid modernity is supplying schools with an ever greater mix of learners, from all kinds of social and cultural backgrounds. (The teachers, however, still tend to represent national solidity, being mostly members of the urban middle class from the dominant ethnic group(s).) And the learners' imaginations are increasingly shaped by the values of liquid modernity, which resists being too closely tied to a particular place, particular traditions, or some indisputable hierarchy of knowledge. In many countries there are complaints about the diminishing of children's literary awareness, the weakening of historical consciousness, the dominance of practical concerns in learners' choices. Others, however, less committed to traditional solidity-values, are more apt to celebrate such developments, seeing in them successful adaptation to the demands of today's world.

On the linguistic side of the school, several symptoms of the crisis are visible. A massive decline is taking place in the teaching of foreign languages other than English, even in countries such as those of eastern Europe where English has scarcely any cultural roots. Indeed, the lack of roots

Eble jam estas klare, kial la lernejoj konstruitaj per la solida moderneco nun alfrontas verajn problemojn, eĉ specon de krizo — ĉar la likva moderneco trudas al ili defiojn, por kiuj ili tute ne taŭgas. Certe estas vere, ke la lernejoj celas plivastigi la individuan liberon de la lernantoj, tamen nur ene de la limoj de la ŝtato. Kaj oni ankaŭ supozis, ke la lernantoj estos lokdevenaj, do la ĉefa defio estos malkupli ilin de la loka aparteno kaj kultivi en ili nacian identecon. Nun la likva moderneco provizas la lernejojn per ĉiam pli miksita gamo de lernantoj, el ĉiuspecaj sociaj kaj kulturaj fonoj. (La instruistoj, tamen, restas plejparte reprezentantoj de la nacia solideco: ĉefgentaj burĝaj urbanoj.) Kaj en la fantazioj de la lernantoj pli kaj pli rolas la valoroj de la likva moderneco, kiu rezitas troan ligitecon al difinita loko, difinitaj tradicioj, nepridubebla hierarkio de scioj. Multlande oni plendas pri malkresko de literatura eduko, malfortiĝo de historia konscio, troa praktikemo en la elektoj de la lernantoj. Sed aliaj, malpli ligitaj al la tradicia solidismo, ĝuste fieras pri tiu evoluo, vidante en ĝi sukcesan adaptiĝon al la postuloj de la nuntempo.

Ĉe la lingva flanko de la lernejo, oni vidas plurajn simptomojn de la krizo. Amase ŝrumpas instruado de aliaj fremdaj lingvoj krom la angla, eĉ en landoj, kiel tiuj de orienta Eŭropo, kie tiu lingvo apenaŭ havas kulturajn radikojn. Fakte la manko de radikoj estas iusence ĝuste avantaĝo: ĝi respondas pli precize al la aspiroj de la likva moderneco, ol povas lingvo ligita al malnovaj luktoj kaj identecoj. Samtempe kreskas dubo pri la estonteco de aliaj naciaj lingvoj, eĉ tre grandaj kiel la germana aŭ itala: oni prognozas perdon de tereno al la angla, unuavice sur la kampo de su-

may even work to English's advantage: it offers a better fit with the values of liquid modernity than is possible for languages tied to ancient struggles. At the same time, doubts are spreading regarding the future of other national languages, even such major tongues as German or Italian: they are predicted to lose ground to English, first of all in the domain of higher education and in the mass media, as well as in international companies and institutions (e.g. those of the European Union), and gradually thereafter in other important domains of the national language ecology. All this can be seen as the linguistic dimension of the tide of liquid modernity across multiple areas of contemporary life — thus, a set of developments not solely linguistic, but also cultural, economic, psychological, and so on.

pera edukado kaj en la amaskomunikiloj, krome en la internaciaj firmaoj kaj instancoj (ekzemple tiuj de Eŭropa Unio), kaj poste laŭgrade en aliaj gravaj kampoj de la nacia lingva ekologio. Temas ĝuste pri lingva dimensio de la alruliĝo de likva moderneco en multegaj kampoj de la nuntempa vivo – do ne afero nure lingva, sed ankaŭ kultura, ekonomia, psikologia, kaj tiel plu.

## 6 A closer look at the ecological side / La ekologia flanko, pli profunde

It is now possible to zero in on one aspect of these developments that is central to the theme of this paper: that is, ecology in its usual sense, as applied to living systems. It is hardly necessary to expand at length about the deep crisis that modern societies have brought on themselves through overexploitation of natural resources and excessively short-term management of water, air and earth. It is not only climate change that is at issue, despite its recent dominance of the headlines, but many other symptoms of our civilization's unsustainability. When one thinks of educational responses to the crisis, one tends to imagine lessons on recycling, environmental restoration, energy conservation and so forth. Yet education's contribution to the crisis has been much more profound and complicated than is generally realized. Recall that the school system is deliberately designed to detach the learner from his or her birthplace and initiate them into a national identity, with the ability to move around freely in response to economic and political circumstances. In this context it

Indas ĉi tie enfokusigi unu aspekton de tiu evoluo, kiu proksime ligiĝas al nia temo hodiaŭ: t.e. la ekologian. Ne necesas tamtami longe pri tio, ke niaj modernaj socioj alfrontas tre profundan krizon pro troa ekspluatado de la naturaj risursoj kaj tro mallongvida prizorgo de akvoj, aero, kaj tero.
Ne temas nur pri klimatŝanĝo, kiu tiel okupis la novaĵojn lastatempe, sed pri multaj aliaj simptomoj de la nedaŭripovo de nia nuna civilizacio. Kiam oni pensas pri edukaj respondoj al tio, oni imagas ĉefe lecionojn pri reciklado, purigado de la medio, ŝparado de energio kaj simile. Tamen la rolo de edukado en la tuto estas multe pli profunda kaj komplika, ol oni kutime supozas. Memoru, ke la lerneja sistemo estas konstruita, tute intence, por malkupli la lernanton de la naskiĝloko kaj enkonduki lin aŭ ŝin en la nacian identecon, kun ebleco libere transloĝiĝi responde al ekonomiaj kaj politikaj cirkonstancoj. Tio neprigas, ke le lerneja programo ne fokusiĝu al lokaj apartaĵoj, krom por ilustri pli ĝeneralajn fenomenojn, aŭ por marki

is essential that the school program not be focused on local particularities, except for the purpose of illustrating more general phenomena or to single out something of national significance. Of course, people still learn about the places where they live, but not through the agency of the school, to which quite a different task has been confided.

The implication is that for several generations children have been intensively educated in a worldview that treats the detailed history, culture, nature, geography of a place as relatively insignificant compared to the broader history, culture, nature, geography of the country as a whole. Coupled with other consequences of modernization (more frequent travel, urbanization, immigration and so on), that means that fewer and fewer people have a strong attachment to the place where they live, or a detailed knowledge of it. And what one doesn't know well, one cannot love well or tend well. Of course, volunteer groups can take that task on themselves, but they are in the position of trying to patch the holes in the social fabric while the holes keep on getting bigger from generation to generation.

The linguistic dimension of this, of course, is the extinction of dialects and local languages[7]. I have a personal interest in the fate of indigenous languages — languages always very closely tied to the local environment and local history. A huge proportion of the five or six thousand languages that are still spoken consists of just these kinds of languages, which are now disappearing at a truly staggering rate around the world. The loss of biodiversity is paralleled by the loss of linguistic diversity. But the analysis presented here may now have made it apparent why this process will not be halted without changing the more general processes of modernization. Many indigenous language activists believe, of course, that it is necessary to modernize, in a sense, the languages themselves, equipping them with dictionaries, grammars, textbooks, litera-

ion de nacia signifo. Kompreneble homoj plu lernas pri siaj loĝlokoj, sed ne pere de la lernejo, al kiu oni konfidis tute alian taskon.

Tio signifas, ke dum pluraj generacioj oni intense edukis ĉiujn infanojn al mondbildo, en kiu la detala historio, kulturo, naturo, geografio de ĉiu loko ŝajnas relative malgrava kompare kun la pli vasta historio, kulturo, naturo, geografio de la lando. Kunlige kun aliaj sekvoj de la modernigo (pli da veturado, enurbiĝado, migrado kaj simile), tio signifas ke malpli kaj malpli da homoj havas fortan ligon kaj detalan kono de sia loĝloko. Kaj kion oni ne bone konas, tion oni ne povas bone ami nek bone prizorgi. Kompreneble, amatoraj societoj povas preni sur sin tiun zorgon, sed ili kvazaŭ provas fliki truojn en la socia teksaĵo, dum la truoj mem konstante pligrandiĝas de generacio al generacio.

La lingva dimensio de tio, kompreneble, estas la formorto de dialektoj kaj lokaj lingvoj[8]. Mi mem havas apartan intereson pri la sorto de indiĝenaj lingvoj – lingvoj ĉiam tre proksime ligitaj al la loka naturo kaj loka historio. Grandega proporcio de la kvin aŭ ses mil lingvoj ankoraŭ parolataj de la homoj estas ĝuste tiaj lingvoj, kiuj nun malaperadas je tute kriza ritmo tra la tuta mondo. La perdon de biologia diverseco paralelas la perdo de lingva diverseco. Sed eble per la analizo, kiun mi nun prezentis, vi komprenos ke ne eblas haltigi tiun procezon sen ŝanĝi la pli ĝeneralajn procezojn de la moderniĝo. Multaj aktivuloj por indiĝenaj lingvoj kompreneble pensas, ke necesas kvazaŭ modernigi tiujn lingovjn mem, provizante ilin per vortaroj, gramatikoj, lernolibroj, literaturo kaj tiel plu. Eble tie kaj jene tiu strategio povas ankoraŭ sukcesi, kvankam nur koste de certa intimeco en la rilatoj perataj de tiu lingvo, kiam ĝi iĝas pli burokrateca, pli formala, pli normigita. Kiel ĝenerala strategio ĝi tamen povas nur fiaski, ĉar la mondo ne povas vivteni centojn aŭ milojn de novaj kvazaŭŝtatetoj, nek tiuj povas vivteni sin per nur kelkaj miloj da parolantoj. Tiel ankaŭ la pretendo de kelkaj, ke la ĝenerala

ture and so on. It is possible that such a strategy might succeed here and there, although only at the cost of a certain intimacy in the relationships mediated by the language when it becomes more bureaucratic, more formal, more standardized. As a general strategy, however, it is doomed to failure, for the world cannot provide a home for hundreds or thousands of new quasi-ministates, nor can the latter maintain themselves on the basis of only a few thousand speakers. For this reason, the claim sometimes made that the general adoption of Esperanto could remove the pressure from these languages and allow them to flourish in peace is certainly a grave oversimplification of the problem.

enkonduko de Esperanto povus forpreni la premon el tiuj lingvoj kaj lasi ilin floradi en paco, certe ege trosimpligas la problemon.

## 7 Towards a new linguistic ecology / Survoje al nova lingva ekologio

Should we therefore conclude that the game is up, whether for linguistic diversity in general, or for Esperanto's aspirations to bring about a fundamental change in the linguistic relations among people? This would be akin to arguing that we have already made such a mess of our relationship with the planet that the only option left is to build the spaceships to carry us to Mars. My personal preference is to look for alternatives that perhaps will not be fully realized but nonetheless offer goals worth working towards.

From everything said so far, it must be clear what a critical role is played by education in the linguistic ecology of modernity, and therefore in whatever might replace it. In other words, we need to think carefully and deeply about how we educate if we want any other linguistic future than the one we now see on the horizon, in which most languages have disappeared from use and the rest are struggling to hold their own against the pressure of English. My preferred label for this alternative future is *transmodernity*. As an educational vision, it entails renewing people's ties with the place they live – its unique history, culture, natural environment and

Ĉu do konkludi, ke la ludo estas jam perdita, ĉu por la lingva diverseco ĝenerale, ĉu por la aspiroj de Esperanto fundamente ŝanĝi la lingvajn rilatojn inter la homoj? Nu, tio similus al la argumento, ke ni jam tiugrade fuŝis nian rilaton kun la planedo, ke restas nur ekkonstrui la kosmoŝipojn por iri al Marso. Mi mem preferas serĉi alternativojn, kiuj eble ne plene realiĝos sed tamen prezentas celojn alstrebindajn.

El ĉio dirita devas esti klare, kian kernan rolon ludas la edukado en la lingva ekologio de la moderneco, kaj sekve en kiu ajn anstataŭa sistemo. Alivorte, ni devas pensi atente kaj profunde pri niaj manieroj eduki, se ni deziras lingvan estontecon alian ol tiu, kiun ni jam ekvidas ĉehorizonte — en kiu la plimulto de la lingvoj jam malaperis el praktika uzo kaj la restantaj nur pene vivtenas sin kontraŭ la premo de la angla. Mia preferata etikedo por tiu alternativa estonteco estas *transmoderneco*. Kiel eduka vizio, ĝi premisas renovigon de la ligoj inter la homoj kaj iliaj loĝlokoj – ties kulturoj, historioj, naturaj apartaĵoj kaj tiel plu – tamen komprenante iliiajn rolojn en pli vastaj fenomenoj de la regiono, la nacio, la planedo.

Kiel lingva vizio, ĝi signifas malstriktigi

so on – while giving due weight to its connections with the broader phenomena of region, nation, and planet. As a linguistic vision, it means loosening the monolithic grip of the national languages in favour of a deliberately cultivated multilingualism in which Esperanto plays an important but not dominant role. And as an ecological vision, it implies living lightly on the earth by placing greater value on local production, low-impact technologies, and care for other living things and systems. In the same way that modernity hangs together as a coherent system, transmodernity displays an alternative coherence, one that offers a home for many diverse efforts to overcome modern fragmentation.

Interlinguistics, in this framework, has a vital role to play not only for its insights into the *ways* in which language divides people and brings them together, but also because it is, for the most part, linked to a practice: the use and cultivation of Esperanto, a language built upon transmodern ideals[9]. But a much broader dialogue with the linguistic, educational and ecological sciences is required in order for this potential to be realized. Only the most general features of this dialogue have been sketched here. Filling in the details is a worthy project for the new generation of interlingual scholars.

la unuecigan premon de la naciaj lingvoj favore al konscie kultivata multlingvismo, en kiu Esperanto ludas gravan sed ne superregan rolon. Kaj kiel ekologia vizio, ĝi implicas vivi malpeze sur la tero per la revalorigo de loka produktado, malnocaj teknologioj, kaj la prizorgado de aliaj vivantaĵoj kaj vivsistemoj. Same kiel la moderneco koheras sisteme trans ĉiuj siaj facetoj, la transmoderneco elmontras alternativan koherecon, en kiu povas hejmi multaj diversaj klopodoj kontraŭi la diseriĝemon de la modern mondo.

La interlingvistiko, en tiu kadro, povas ludi nemalhaveblan rolon. Ne temas nur pri ĝia prilumado de la disigaj kaj kunigaj fortoj de lingvoj, sed ankaŭ pri tio, ke ĝi plejparte ligiĝas al konkreta praktiko: al la uzado kaj kultivado de Esperanto, lingvo konstruita sur idealoj transmodernaj[10]. Por la realigo de tiu potencialo tamen necesas multe pli vasta dialogado kun la lingvaj, edukaj kaj ekologiaj sciencoj. Nur la plej ĝeneralajn trajtojn de tiu dialogado mi skizis ĉi tie. Plenigi la bildon per la detaloj estas inda projekto por la nova generacio de interlingvistoj.

# Note / Notoj

[1]The original talk was given in Esperanto. All revisions and the English translation are my own.

[2]La originan prelegon mi faris en Esperanto. Ĉiujn reviziojn kaj la anglan tradukon faris mi mem.

[3]The terms linguistic ecology and ecolinguistics have limited currency, but there is no commonly accepted definition of either of these as a discipline or field of study. For examples, see Mühlhäusler (1996), Fill (1996), Bastardas-Boada (1996), Calvet (1999), and more recently Bang and Døør (2007).

[4]La terminoj *lingva ekologio* kaj *ekolingvistiko* uziĝas certagrade, sed ne ekzistas komuna difino de ili kiel fakoj aŭ studkampoj. Por ekzemploj, vidu Mühlhäusler (1996), Fill (1996), Bastardas-Boada (1996), Calvet (1999), kaj pli lastatempe Bang and Døør (2007).

[5]for an introduction to Bauman's thinking, try the essays in Bauman (1992). The more recent Bauman (2000) is one of a trilogy exploring the sociology of globalization.

[6]Por enkonduko al la pensado de Bauman, provu la eseojn en Bauman (1992). La pli lastatempa verko Bauman (2000) estas unu el triopo, kiuj esploras la sociologion de tutmondiĝo.

[7]On the disappearance of languages around the world, see Nettle and Romaine (2000). On the role of the school system, see Skutnabb-Kangas (2000). On links between linguistic and biological diversity, see Harmon (2002).

[8]Pri la malaperado de lingvoj tutmonde, vidu Nettle and Romaine (2000). Pri la rolo de la lernejoj, vidu Skutnabb-Kangas (2000). Pri ligoj inter lingva kaj biologia diverseco, vidu Harmon (2002).

[9]I have argued for an ecological conception of interlinguistics in a number of essays including those listed in the Bibliography. Fettes (1997) Fettes (2000) Fettes (2008)

[10]Mi argumentis por ekologia konceptado de la interlingvistiko en pluraj eseoj, inkluzive de tiuj listigitaj en la bibliografio. Fettes (1997) Fettes (2000) Fettes (2008)

# About the author / Pri la aŭtoro


### Contact address / Kontaktadreso

Mark Fettes
Faculty of Education
Simon Fraser University
8888 University Drive
Burnaby, BC
Canada V5A 1S6
Email / Retadreso: mtfettes@sfu.ca.
Web / Retejo: http://www.educ.sfu.ca/profiles/?page_id=140


# Copyright


(cc) (BY:) ($) (ɔ) 2010 Mark Fettes. Pubblicato in Italia. Alcuni diritti riservati.

# Bibliography / Bibliografio


Bang, J. and J. Døør (2007). *Language, ecology and society. A dialectical approach.* London: Continuum. 154

Bastardas-Boada, A. (1996). *Ecologia de les llengües. Medi, contactes i dinàmica sociolingüística.* Barcelona: Proa. 154

Bauman, Z. (1992). *Intimations of postmodernity.* London, New York: Routledge. 154

Bauman, Z. (2000). *Liquid modernity.* Cambridge: Polity. 154

Calvet, J.-L. (1999). *Pour une écologie des langues du monde.* Paris: Plon. 154

Fettes, M. (1997). Esperanto and language awareness. In L. van Lier and D. Corson (Eds.), *Encyclopedia of Language and Education, Volume 6: Knowledge about Language*. Boston: Kluwer Academic. 154

Fettes, M. (2000). (un)writing the margins: Steps toward an ecology of language. In R. Phillipson (Ed.), *Rights to Language: Equity, Power and Education*. Mahwah, NJ: Lawrence Erlbaum. 154

Fettes, M. (2008). Esperanto, an asian language? growth-limiting and growth-promoting factors in an evolving interlingual ecosystem. *Sophia Journal of European Studies* (1). 154

Fill, A. (1996). *Sprachökologie und Ökolinguistik.* Tübingen: Stauffenburg Linguistik. 154

Harmon, D. (2002). *In light of our differences: How diversity in nature and culture makes us human.* Washington, DC: Smithsonian Institute. 154

Mühlhäusler, P. (1996). *Linguistic ecology: Language change and linguistic imperialism in the Pacific region.* London and New York: Routledge. 154

Nettle, D. and S. Romaine (2000). *Vanishing voices: the extinction of the world's languages.* Oxford: Oxford University Press. 154

Skutnabb-Kangas, T. (2000). *Linguistic genocide in education – or worldwide diversity and human rights?* Mahwah, NJ: Lawrence Erlbaum. 154